

alproksimiĝis al ŝi—ĉe ĉiu flanko po unu—kaj tre larĝe malfermis la okulojn kaj buŝojn. Tamen dum la rakontado ŝi iom post iom fariĝis pli sinfida.

La aŭskultantoj restis tute trankvilaj ĝis ŝi rakontis pri la deklamo (antaŭ la Raŭpo) de la poemo “*Patro Vilĉo*.” Kiam ŝi diris al ili ke la vortoj elvenis el la buŝo tute malpravaj, la Falsa Kelonio profunde enspiregis kaj diris “Jen tre kurioza fakto.”

“Apenaŭ povus esti io pli kurioza” aldonis la Grifo.

“La vortoj elvenis malpravaj” ripetis la Falsa Kelonio, kaj profunde pensis.

Post kelkaj momentoj ĝi diris:—

“Mi do tre ŝatus aŭskulti, se la Fraŭlino volus nun deklami ian versaĵon. Vi ordonu ke ŝi komencu.”

Li rigardis la Grifon kvazaŭ li kredas ke ĝi havas la rajton ordoni ŝin.

“Vi stariĝu” diris la Grifo al Alicio kaj deklamu “*la Dormemulo*.”

“La kreitaĵoj ja terure ordonadas min” pensis Alicio “kaj igas min deklami la parkeraĵojn same kiel se mi estus en la lernejo.”

Tamen ŝi leviĝis kaj komencis la deklamon, sed ŝia kapo pleniĝis de la Omara Kvadrilo en tia grado ke apenaŭ ŝi konsciis kion ŝi diras, kaj la vortoj venis tre, tre kurioze:—

*Jen la voĉo de l' Omar' ! mi aŭdis la krion,  
“ Vi min bakis tro brune, vi iru Azion ! ”  
La hararon netigas en ĉiu okazo  
La anas' per l' okuloj, sed li per la nazo.  
Kiam seka la sablo, li kvazaŭ monarĥo  
Malestime parolas eĉ pri la ŝarko.  
Kiam tajdo kun ŝarkoj amase enfluas  
Malŝiera la voĉo per kiu li bruas.*

“Tiu certe ne estas la vortoj kiujn mi lernis en la infaneco” diris la Grifo.

“Tiujn vortojn mi neniam aŭdis ĝis la nuna momento” diris la Falsa Kelonio “ĝi ja estas nur sensencaĵo.”

Alicio diris nenion. Fininte la version, ŝi sidigis, metis la manojn al la kapo, kaj ekmiris ĉu iam ŝia vivo refariĝos ordinara.

“Mi tre volus scii la klarigon de ĉio tio” diris la Falsa Kelonio.

“Ŝi ne povas klarigi” la Grifo vigle intermetis. “Eldiru la duan version.”

“Sed pri lia hararo” persistis la Falsa Kelonio “li fakte ne povus netigi ĝin per la nazo.”

Alicio havis nenion por diri; ŝi nur rigardis ilin senhelpe.

“Vi eldiru la duan version” ripetis la Grifo “ĝi komenciĝas per la vortoj ‘*Lian domon pasante—*’”

Alicio ne kuraĝis malobei, kvankam ŝi estis certa ke ĉio nepre elvenos malprave. Per tremanta voĉo ŝi eldiris:—